# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

## El la Internacio

**La venonta mondkongreso liberpensula** okazos laŭ decido de l'plenuma komitato de l'Internacia Liberpensula Unuiĝo (IFU) en Hispanio. La diversaj sekcioj estas alvokataj jam nun zorgi, ke okazu multnombraj delegoj. – Ĉefpunktoj de la tagordo estos:

1) La ĝenerala politika situacio,
2) La kulturpolitika reakcio,
3) Socipolitikaj tendencoj de l'eklezioj,
4) La ideologia atako de l'reakcio k la aparta tasko de l'IFU.

Krome estas projektita kontraŭmilita manifestacio. Rilate al la apartaj cirkonstancoj en Hispanio ankaŭ la lernejproblemo estas pritraktota.

**Internacia korespondado inter liberpensul-infanoj** ekfunkciis. Kiu volas partopreni, estas petata, sendi sciigojn pri adreso, aĝo, lernejo, dezirata korespond-lingvo k -lando al

Kultursekretariat des Deutschen Freidenker Verbandes, Berlin SW 29, Gneisenaustrasse 41.

## El diversaj landoj

**Germanio:**

Post kiam la germana registaro en majo 1932 malpermesis la komunistan liberpensulan unuiĝon, la reakciuloj klopodegas pereigi la tutan germanan liberpensulan movadon. – Antaŭ nelonge la ĉefkomitato de l'prusia parlamento akceptis proponon de la naciistoj, kiu postulas la malpermeson al la Germana Liberpensula Unuiĝo (kun pli ol 600 000 membroj!).

Sed la liberpensula movado ankoraŭ vivas! – La nombroj de l'eksiĝoj el la eklezioj ĉiam kreskas. Dum la jaro 1931 eksiĝis sole en Berlin 79 274 homoj kompare kun 66 635 en la antaŭa jaro. Tio signifas kreskon je proksimume 19%. Perdis la protestantoj 71 102, la katolikoj 7450, la judoj 722 adeptojn. – En Essen okazis, kiel respondo al la tie okazinta katolika jarkunveno, impona kulturtago de la liberpensularo en Rejnlando k Vestfalio. Grandioza manifestacio atestis la batalemon k oferemon de l' proletaro malgraŭ mizero k ĉikano.

**Hispanio:**

Antaŭ nelonge la registaro forpelis la kardinalon Segura pro respublikmalamika propagando. La papo nun investis kiel posteulon la episkopon de Oviedo, Luis i Perez. – Ruza artifiko! Perez estas la fondinto de unu katolika sindikato k subtenis en 1922 dum la granda minista striko la laboristojn, haviginte manĝaĵojn al iliaj infanoj. Tiele li laŭdire ricevis la alnomon „socia episkopo". – La katolika eklezio ĉiam bone akomodiĝas!

**Britio:**

„The Catholic Directory" (La Katolika Informilo) raportas, ke en la jaro 1931 eniris la katolikan eklezion de Anglio k Skotlando 11 980 konvertitoj. – 46 novaj preĝejoj k kapeloj estas malfermitaj, do preskaŭ ĉiusemajne unu. Tiele nun ekzistas sume 2274 katolikaj preĝejoj. – Ok novaj katolikaj mezlernejoj estas malfermitaj, nun ili nombras 519. – La nombro de la elementaj lernejoj plialtiĝis je 20 al 1331. – La nombro de l' katolika popolo kreskis en la lastaj 12 monatoj je 28 993 al 2 235 237.

Kompiltradukis laŭ „Ateisto", „Liberpensulo" k „Fajrero" 11 761.

**Meksikio:**

La papo antaŭ nelonge publikigis novan enciklikon, en kiu li akre atakas la meksikian registaron pro la tieaj „kristan"-persekutoj. Ne tre longe post la publikigo de tiu ĉi encikliko la meksika registaro ekzilis la ĉefepiskopon Rus i Florez (Ruiz y Flores) pro tiu encikliko k lia konduto kontraŭ la registaro.

Unu el la ĉefaj kaŭzoj por la encikliko estis la leĝaro de Meksikio k de ĝiaj subŝtatoj kontraŭ la katolika eklezio. 13 subŝtatoj k la federacia teritorio dekretis leĝojn pri la nombro de l' pastroj, al kiuj estos permesate praktiki diservon. Ĉiu meksikia subŝtato laŭ la konstitucio havas la rajton fari tion.

Plej energie procedis *Tabasko,* kies gubernatoro Kamaval estas „fikonata persekutisto al kristanoj". Depost 1924 tie validas leĝo, laŭ kiu povas praktiki diservon nur edziĝinta pastro. Nur unu sola pastro ekzistas en tiu ĉi subŝtato kun 224 000 loĝantoj. *Malsupra Kalifornio* permesas 2 pastrojn por 60 000 loĝantoj, *Ĵiapas* (Chiapas) 1 por 60 000. La federacia teritorio *Meksiko* inkluzive Meksikurbo havas 25 pastrojn, t. e. 1 por 43 200 loĝantoj. *Jukatan* k *Ĵihuaha* (360 000 k 440 000 loĝantoj) permesas 1 pastron por 40 000 homoj. „Iagrade funkcianta pastrumo" estas ebla nur en *Aguas Kaliente;* tie ekzistas 22 pastroj por 110 000 loĝantoj. En tuta Meksikio kun pli ol 8 milionoj da loĝantoj funkcias 314 pastroj.

La katolika gazeto, el kiu mi ĉerpas ĉi tiujn informojn, finas: „Nenia provo de la meksikia registaro pravigi sin povas kaŝi la brutan pruvon pri la senkultureco de tia bandita regado!" Nu, fakte la meksikia registaro ne havas kaŭzon timi la riproĉon pri senkultureco. Kion ĝi faris, ja estas nur la unua paŝo por ebligi konstruadon de vera kulturo baziĝanta sur libera memdecido de la homoj.

*16 900.*

## Liberpensula fakkunsido en Ŝtutgarto

*Faktoj:* Bedaŭrinde nur partoprenis germanoj. La pritraktoj estis nur unuflankaj, ĉar mankis sugestoj el aliaj landoj.

*Kialoj:* Ke la granda plimulto de l' kongresintoj, do ankaŭ de l'liberpensuloj, en Ŝtutgarto memkompreneble estis el Germanio, ke samtempe kun nia liberpensula fakkunsido okazis ankaŭ anarkista, tio ne senkulpigas la absolutan mankon de l'alilandanoj. – Ĉu la liberpensulaj SAT-anoj en Germanio estas pli aktivaj ol en aliaj landoj?

*Taskoj:* La liberpensulaj SAT-anoj en aliaj landoj pruvu la malon! – Estontaj OKK-oj zorgu, ke ne okazu paralelkunvenoj!

*Arbarulo.*

**ĈU VI JAM ANTAŬMENDIS**

*laŭ speciala tarifo (1 ekz. 0.30 mk. g., 5 ekz. 1.– mk., 10 ekz. 1.80 mk., 20 ekz. 3.30 mk. – ĉiu plia deko 1.50 mk.) kvanton el la*

**400-a NUMERO de „S-ULO"** ?

*SE NE, do ne prokrastu fari vian mendon. Tiu n-ro estos 16-paĝa, dukolora, bele ilustrita, sekve speciale taŭga kiel* varbnumero *k facile disvastigebla!*

*Mendojn akceptas* Administrejo de SAT, *Kolmstr. 1,* Leipzig O.27.